


LA JUNAVIVO



MONATA ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.

ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. AŬ EGALVALORO

LA FORVETURO DE KAPITANO BONNINGA AL ANGLUJO.

La „Corsica” spitas malamikojn, minejojn, ventegojn. (daŭrigo)

„Jen la fino”, pensis kapitano Bonninga kaj la ceteraj opiniis ne alie.

Ĉu tio estos la fino?

Sed la toplumo malaperis por reaperi post momento. Tiam la streĉiĝo rompiĝis, ĉar ŝipestro B. komprenis, ke li prenis bordlumon por toplumo.

La pluvo ĉesis, dum la vido pliboniĝis. Sed kapitano B. ne ŝatis tiun bonan vidon. Li preferis alie. Je la unua horo matene la „Corsica” forlasis la minejon.

La streĉiĝo malpliigis, ĉar antaŭe estis la libera maro kaj denove ekpluvegis. La vento plifortiĝis, la ondoj daŭre plialtiĝis kaj la ŝipo malpliigis sian rapidecon. Tio kaŭzis novan zorgon. La germana gardistaro troviĝis alte sur la montoj kaj je la 4-a horo kaj 30 minutoj la „Corsica” ne estis pli ol dek kvin mejlojn de la marbordo. Feliĉe la nuboj pendis malalte.

La „Corsica” veturadis la tutan tagon kaj okazis nenio menciinda. Je la 16-a horo el la vento kreskis ventego. La vido estis

malbona pro la suprenblovita ŝaŭmo de la ondegoj. La ŝipo tangegis kaj malfacile antaŭeniris. Tiom malbona fariĝis la vetero, ke du maristoj ege marmalsaniĝis kaj la kuiristo senkonsciigis kaj ne kapablis daŭrigi sian laboron.

Ŝipisto B. ne havis direktiliston kaj komprenis, ke praktike li nun staras sola. La maŝinisto devis resti ĉe la motoro kaj li prenis la direktilon. La ŝipo progresis malmultege kaj iom post iom ĝi eĉ kuŝis senmova. Kelkfoje ĝi levis la antaŭŝipon tiom alten, ke la malantaŭa parto malaperis duonan metron sub la akvo.

Kun motoro turniĝanta per la tuta forto oni trapasis dum unu gardo (4 horoj) dek du marmejlojn. Denove oni eniris nokton. Tamen por malkovro ne plu ekzistis granda timo.

Mardon, la 10-an de aprilo. La pasintan nokton la vento iom turniĝis okcidenten; la maro iom trankviliĝis. La „Corsica” progresis du mejlojn pli ol en la antaŭa gardo. La vido estis klara, poste eĉ neordinare klara. Tio fariĝis nova inkubo: Ĉu la germanoj komencos la persekuton? Kapitano B. daŭre rigardis malantaŭen, en la direkto de Drontheim. Tie troviĝis la grandaj aerodromoj ²⁾). La „Corsica” ne estis pli ol 110 mejlojn de la norvega marbordo kaj estis tiutempe multaj patrole flugantaj aeroplanoj. La sunlumo invadis de malantaŭe kaj ŝipestro B. pendigis litkovrilojn ĉirkaŭ la direktilistejon por eviti briladon de la fenestroj. La ŝipo daŭre pliigis sian rapidecon. La vento turniĝis nordokcidenten. Kiam la tago finiĝis, la maŝinisto gratulis ŝipestron B.

La sekvanta nokto estis senventa. La maro moviĝis en longa ondado kaj la malsana anaro resaniĝis. Poste la maro fariĝis pli moviĝema. La vento denove ekblovis el la oriento-sudoriento. La „Corsica” tenis sian rapidecon, sed ege ruliĝis pro tio, ke la antaŭa ondado kontraŭvenis. Pluvis, la vento denove plifortiĝis kaj grandaj akvoamasoj transversis la ŝipon. La maro entute similis bolantan amason de ŝaŭmo kaj ondegoj. La tutan sekvintan tagon daŭradis la ventego. Vespere la ondoj atingis taksitan altecon de 7 metroj kaj grandegaj ondoj transiris la ŝipon. La oleostoko maltrankvilige reduktiĝis kaj kapitano B. ege laciĝis. Li ne fariĝis dormema, sed la korpo perdis sian rezistopovon pro malsatego. Absolute mankis momento por manĝi aŭ trinki ion.

Ĵaŭdon, la 12-an de aprilo, daŭre ventegis. La ŝipo forte balanciĝadis kaj veturis ne pli ol 6 mejlojn ĉiuhore. La vido estis sufiĉe bona. Poste ekpluvis. Je la 13-a horo ŝipestro B. haltigis la motoron kaj pretigis la sondilon. Laŭ distanco je la logo oni devus esti ĉe la Shetlandaj insuloj, tamen estis eble, ke oni troviĝas tro

2) aero-dromo = flug-haveno.

okcidente. La kompaso ne estis fidinda pro tio, ke la masto kuŝis horizontale sur la ŝipo. La sondilo ne atingis la marfundon. Tial oni direktis pli suden, komprenante, ke oni troviĝas tro okcidente. Subite kriis la direktilanto:

„Kapitano, mi vidas fumtufon sur la horizonto!”

Kapitano B. rigardis kaj ricevis skuon. La fumtufo venis el la direkto, el kiu ankaŭ la „Corsica” venis.

Ĉu estis germana torpedoŝipo, kiu persekutis ilin? Denove ega streĉiĝo. Kapitano B. eniris la kajuton kaj prenis du mangrenadojn. La malamiko ne kaptu lin vivanta. Post dek minutoj aperis pli da fumtufoj. Tio estis, trankviliga signo, ĉar ne estis kredeble, ke la tuta germana militŝiparo persekutas la bordŝipon „Corsica”.

Ekaperis hulo de ŝipo kaj alia kaj ree alia. Estis 15 britaj ĉasoŝipoj, kiuj eskortis tri aeroplanŝipojn. Granda estis la ĝojo sur la „Corsica” kaj la plej granda nederlanda flago flirtis je stango. Kiam la ŝipo sur kiu troviĝis la komandanto, preterpasis, la anaro de la „Corsica” salutis per la flago. Je distanco de 200 metroj la ŝiparo pasis kaj duonan horon poste ĝi jam zigzage malaperis el la vido. Por la anaro de la „Corsica” tio signifis, ke ili estas proksime al la bordo. Kaj vere, je la 15-a horo kaj 30 minutoj ili baborde ekvidis la marbordon de la Ŝetlandaj insuloj.

La viroj estis kortuŝitaj kaj gratulis unu la alian.

Ankoraŭ ventegis, sed la maro plikvietiĝis, ĉar la ŝipo iom post iom venis sub la protekto de la insuloj. La tutan nokton oni restis veturante.

Vendredon, la 13-an de aprilo, ŝipestro B. estis lacega. Nigriĝis antaŭ liaj okuloj kaj li fleksiĝis. Al la direktilanto li diris: „Harry, voku aŭ piedbate veku min tuj, kiam vi vidas lumon antaŭe.”

Je la sesa horo oni vekis lin, ĉar vidiĝis lumo je tribordo. Ĝi estis de trenretŝipo. Je la sepa horo ŝipestro B. vidis la lumon de Kabo Wrath, du strekojn triborde je distanco de proksimume 15 mejloj. La rapido estis naŭ mejloj. La malantaŭa ferdeko estis tute difektita kaj sufiĉe da averio estiĝis dum la ventegoj.

Tiam oni transiris, sen kompasoj, sen taŭga marmapo, al la Hebridoj kaj brita bombardilo el la altaj regionoj pririgardis la etan ŝipon.

Je la 15-a horo la „Corsica” troviĝis antaŭ la haveno Stornoway, sed ĉar la masto kuŝis mallevita, kapitano B. ne povis hisigi pilotflagon. Tial li alvokis fĵsistan ŝipon kaj petis esti enpilotata en la havenon.

Je la 15-a horo kaj dudek la „Corsica” enveturis la havenon kaj 70 minutojn poste ĝi estis ligata al la kajo.

La havenestro tuj venis surŝipen, demandante:

„De kie vi venis, kapitano?”

„De Solvaer en Norvegujo, sinjoro.”

„Kion vi diris, kapitano?”

„Mi diris: Solvaer en Norvegujo, sinjoro.”

„Granda dio! Vi sukcesis forkuri de la germanoj!”

„Jes, sinjoro.”

La doganoj venis, gardistoj estis starigataj ĉe la ŝipo kaj neniu rajtis elŝipiĝi. Sed surŝipen venis kotletoj, frititaj ovoj, ŝinko, blanka pano, cigaredoj kaj bongustaj trinkaĵoj.

En la kajuto dormis ŝipestro Bonninga. Escepte de tiu unu horo la unuan fojon en 120 horoj. Laŭ unu el la ŝipestroj sur lia vizaĝo kuŝis feliĉega rideto.

El „De Blauwe Wimpel” (La Blua Flag-rubando) tradukis K. St.

Bernard Shaw, amiko de la junularo.

En la jaro 1948 mi libertempis en St. Albans (Anglujo). Hazarde mi sciigis, ke la fama brita verkisto loĝas en Ayot-St-Lawrence. Pro tio mi decidis bicikli al tiu „interesa” vilaĝo.

Eksterordinare, sed vere, B. Shaw tuj kaj afable akceptis min, francan junulon. Li eĉ bonvolis diskuti pri la internacia lingvo.

Ni ne akordiĝis pri Esperanto, sed mi tute aprobis lian opinion pri la kvalitoj de internacia lingvo: simpla gramatiko, harmonio, fonetika skribo, uzebla por sciencaj kaj ordinaraj temoj.

Ĉu tio ne estis bela pruvo de sensektarismo kaj intereso al la junularo?

Kiam li mortis, la duan de novembro de ĉi tiu jaro, B. Shaw estis 94-jara! Sed ĉu vi dubas pri la juneco de lia spirito?

Ne mi!

Lucien Giloteaux, Croix, Nord, Francujo.



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

en Haarlem, Nederlando (26/7-2/8-1951).

Ĉar la plej multaj T.J.O.-anoj loĝas en la okcidenta parto de Eŭropo, montriĝis dezirinde ĉi-jare denove organizi la IJKn en la okcidento.

La nederlandanoj do jam eklaboris por akcepti siajn gastojn. Kaj ili plezure faras tion! Kiel kongreslokon ili elektis unu el siaj

plej belaj, malnovaj urboj: Haarlem, la perlon de Nord-Holando. Haarlem kuŝas en tre bela regiono, ne malproksime de la marbordo kun altaj dunoj. La urbestro ĉiel helpas. Ni povos disponi pri du bone ekipitaj lernejoj, kie specialaj kuirejaj staboj pretigos la manĝaĵojn por ni.

Ni faros belajn ekskursojn al Amsterdam, al la mondfama fromaĝofoiro en Alkmaar, kiu ĉiusomere altiras milojn da fremduloj, al Schoorl, Bergen kaj kompreneble al Edam, kie ni havos specialan festvesperon, Monnikendam kaj Volendam (je dimanĉo, kiam la vilaĝanoj portas siajn plej belajn vestojn, la virinoj la tipajn blankajn kufojn kaj la viroj la grandajn ornamilojn sur la vastaj pantalonoj, kiam la tuta ŝiparo kuŝas en la haveno). Kaj — plej bele — ni vizitos ankaŭ Marken, la malgrandan, verdan insulon en la iama Suda Maro. Eble ĝi estas la plej pitoreska loko en la mondo, kun siaj pentrindaj dometoj, konstruitaj sur fosto por ŝirmi ilin kontraŭ la akvo. Kvazaŭ pupoj aspektas la insulanoj en siaj multkoloraj vestoj. Tute aparta mondeto!

Mallonge: Ankaŭ nia 7-a I.J.K. fariĝos interesa! Partoprenu ĝin, kaj vi certe havos neforgeseblan ferion!

La kostoj (inkluzive de ĉio: manĝaĵoj, dormado kaj ekskursoj): por junuloj ĝis 19-jaraj: 30 guld.; por 19-31-jaraĝaj: 35 guld.; por pliaĝuloj: 40.— guld. — Post la 1-a de majo tiuj prezoj estos 5 guldenoj pli altaj.

Bedaŭrinde la kostoj estas altaj, sed vere necesas, ĉar la manĝaĵoj kaj ekskursoj momente estas treege multekostaj.

Sed — espereble niaj subtenantaj amikoj kaj simpatiantoj montriĝos vere subtenemaj! Ĉiu donaco, eĉ la plej eta, estos tre bona!

Pri la ricevitaj donacoj ni raportos en „La Juna Vivo”. Ili estos uzataj nur por helpi malriĉajn ge-partoprenontojn kaj tiujn, kiuj tute ne povas pagi (ekzemple el nepagipovaj landoj). Pro tio nia afabla peto: se vi iel povas malhavi iom da mono (aŭ povas kolekti ĝin) por nia IJK, baldaŭ informu nin pri tio, por ke ni sufiĉe frue sciu, kiom da junuloj ni povos helpi.

La nederlanda sekcio klopodos organizi lotumadon por tiel akiri monon, per kiu ĝi povos helpi siajn junajn anojn. Ĉu eble imitinda ekzemplo por aliaj landoj?

Jen la provizora programo:

26/7: Alveno de la ge-partoprenontoj. (Frue enlitiĝo, ĉar la venontan tagon okazos ekskurso).

27/7: Ekskurso per aŭtobusoj al la mondfama fromaĝofoiro en Alkmaar. Post-

tagmeze al Schoorl, promenado tra la dunoj al Bergen. Vespere: Oficiala malfermo. Salutvortoj de oficialuloj.

28/7: Matene: diskutoj. Posttagmeze: vizito al Zandvoort. Vespere: internacia festvespero.

29/7: Libera mateno: okazo por ĉeesti diservon. Posttagmeze: vizito al Volendam. Festvespero en Edam.

30/7: Matene: laborkunsido de T.J.O. Posttagmeze vizito al la ĉirkaŭaĵoj de Haarlem. Vespere: popoldancado.


31/7: Matene: vizito al la fama, granda preĝejo de Haarlem, la „Sankta Bavo”. Verŝajne orgenkoncerto. Posttagmeze: sportkonkursoj. Vespere: film-prezentado.

1/8: Matene: Vizito al Amsterdam. Ŝipveturo al la urbaj kanaloj. Posttagmeze: vizito al la pitoreska insulo Marken. Adiaŭa vespero.

2/8: Adiaŭo.

Jen do la planoj. La agado nun estas al la ge-partoprenontoj! Anoncu vin baldaŭ, tio multe helpos en la organizado. Ĝis nun ni povos disponi pri 300 lokoj, do ni ne senlime povos akcepti aliĝojn.

Vi bonvolu uzi la oficialan aliĝilon kaj ĉe la aliĝo samtempe pagi garantian sumon de 10.— guldenoj. La aliĝilojn oni adresu al s-ro C. Geurts, M. Tinxgracht 10, Edam, Nederlando. Nederlandanoj sendu samtempe 10.— guld. al ĝironumero 382363, t.n.v. N. Kool, TJO-Centro, W. Grafdijk. Eksterlandanoj povos pagi al sia ĉefperanto. (Oni povas peti pli da aliĝiloj).



I.L.E.I.-RUBRIKO.

(Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Ned. Centra Informejo: Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo).

En la instruistaj kunvenoj dum la pariza kongreso, multaj gekolegoj sugestis enpresigi en la instruista rubriko de „La Juna Vivo” ne nur raportojn kaj dokumentojn (kvankam tre ŝatatajn) sed ankaŭ de tempo al tempo artikolojn, kiuj rilatas nian ĉiutagan laboron en la klasejo.

Ni opinias, ke la ĉi-suba priskribo de k-o Kennedy havos la intereson de diverslandaj ĝeinstruistoj. Eble ĝi povos instigi aliajn rakonti pri propraj spertoj, rimarkoj, aldonoj, aŭ io ajn. Bonvolu sendi al ni.

Red.

Edukado kaj aŭdpovo.

Dum multaj jaroj oni en glasgovaj 1) lernejoj esploras de temp' al tempo la sanon de la lernejoj. Almenaŭ trifoje dum la lerneja vivo la kuracistaro kontrolas, nome: unue kiam la infano ekvizitas la lernejon, je la aĝo de kvin jaroj, tiam je la aĝo de naŭ jaroj kaj fine ĝuste antaŭ ol ĝi forlasos la lernejon. La kuracistoj kutime okupas sin pri la pulmoj, koro, okuloj k.c. de la infanoj. Sed dum la lastaj jaroj ili speciale atentigas la orelojn kun rilato al la aŭdpovo.

1) Glasgow estas urbo en Skotlando.

Same kiel la edukadon de infano povas malhelpi malbona vidkapablo, tiel povas malhelpi ankaŭ la malbona aŭdpovo.

Fakte ekzistas danĝero, ke ni, instruistoj, rigardas junajn lernantojn malfortaj rilate al cerbopovo, kiam efektive ilia malforteco kuŝas en la aŭdpovo de unu aŭ ambaŭ oreloj. La juna lernanto ne bone aŭdas kaj pro tio oni emas juĝi lin stulta.

Jam dum du jaroj oni en glasgovaj lernejoj testas ĉiujn infanojn, kiuj havas ok jarojn. La testita nombro estas ĉiujare proksimume 20.000 kaj el tiu nombro preskaŭ 1.000 havas difekton, etan aŭ grandan, en unu aŭ ambaŭ oreloj.

La ses testistoj estas eks-lernejestroj. Trovinte la difektojn per specialaj instrumentoj, ili aranĝas la testitojn en kvar grupojn.

La unua grupo, la plej multnombra, havas nur malgravan difekton kaj se la instruisto donas al ili konvenajn sidlokojn en la klasĉambro, tio sufiĉas. La dua grupo havas malgrandan difekton, kiun oni povas forigi per kuracista helpo. La aliaj du grupoj havas pli gravajn difektojn. Kaj, ĉar iliaj kazoj estas la plej urĝaj, ili estas la unuaj por ricevi la helpon de kuracisto.

Sed kiel oni povas eltrovi la difektojn? Por tion eltrovi oni uzas du elektrajn instrumentojn. La unua similas al gramofono, sur kiu estas speciale farita disko. Per ĉi tiu disko la infanoj aŭdas voĉon, klare dirante kelkajn ciferojn inter 1 kaj 9. La voĉo de la parolanto fariĝas pli kaj pli mallauĉa, ĝis, ĉe la lastaj ciferoj, ĝi estas flustro aŭdebla nur per tre lerta kaj vigla orelo.

Dum la voĉo diras la ciferojn, la infanoj skribas ilin sur paperon kun vertikalaj kolonoj.

Oni povas juĝi la perdon de la aŭdpovo laŭ la nombro da ciferoj, kiun la infano aŭdis kaj notis.

Se la perdo estas pli ol difinita kvanto, la infano malsukcesis kaj post unu aŭ du monatoj oni denove testas ĝin per la sama instrumento, per kiu oni povas testi dudek personojn samtempe.

Se denove ĝi malsukcesas, oni suspektas difekton en la aŭdpovo kaj ĝi devas submetiĝi al tria testo, sed ĉi tiun fojon per multe pli akurata, sed malpli rapide funkcia instrumento, per kiu oni povas testi nur po unu infano anstataŭ dudek samtempe.

Ĉi tiun duan instrumenton oni nomas „Pure Tone Audiometer” (purtona aŭdmezurilo), ĉar per ĝi oni aŭdas ne voĉojn kaj vortojn kaj ciferojn, sed sonojn de diversaj frekvencoj kaj intensoj, komence de sono, kiu similas la nebulsirenon de ŝipo for sur la maro ĝis la plej alta sono de fajfilo. Survoje de la unua, basa, sono ĝis la tre alta sono troviĝas dek „stacioj” kaj ĉe ĉiu el ili oni testas la aŭdpovon de la infano, notas la aŭdperdon kaj fine faras grafikon por la dekstra kaj maldekstra oreloj. Pere de tiuj grafikoj oni povas grupigi la testitojn per pliposta prizorgado fare de la kuracista stabo de la Glasgova Edukada Aŭtoritato.

D. Kennedy.

Karaj Lernejoj.

Hura! Ankaŭ knaboj nun eklaboris por nia gazeto!

Dankon al tri anglaj knaboj, lernantoj de la Elliston Sec. County School en Cleethorpes!

En sia lernejo ili havas „Lernejo-Parlamento”n kaj pri tio Do-

nald Mudd kaj Leslie Madin faris verkaĵojn por „La Juna Vivo”. Tia parlamento ŝajnas tre interesa, do en la venonta numero certe aperos unu el la verkaĵoj. Sed ni ne jam scias kiu. Tia parlamento certe interesos ankaŭ aliajn lernejanojn. Volonte ni sciis, ĉu ion similan oni havas ankaŭ en aliaj lernejoj, en aliaj landoj.

En la sama lernejo en Cleethorpes oni havas ankaŭ propran gazeton, la „Elliston Echo”. Byron Smith estas la redaktoro de tiu lerneja gazeto. En sia verkaĵo li rakontas al ni, kiel ili mem presas tiun gazeton. Ankaŭ tiu verkaĵo aperos en venonta numero.

Kiuj sekvos?

Kaj nun pri la konkursoj. Ofte ni ricevis plendojn, ĉar ne estas sufiĉe da tempo inter la ricevo de la gazeto kaj la dato por la ensendo de la provoj (solvoj). (Ĉu nur tio estas la kaŭzo, ke tiom multaj neniam sendas ion?)

Estonte vi havos pli da tempo. La solvon de la enigmo en ĉi tiu numero vi bezonos sendi nur antaŭ la 15-a de februaro. Nun ĉiuj do havos sufiĉe da tempo. Faru vian eblon!

Agrablan ferion, bonajn festotagojn kaj feliĉan novjaron!

Ĝis la venonta jaro!

N. K.

NIA VERKILO.

La ĉambro.




1.

Vi vidas multajn objektojn, kvar homojn kaj unu beston.

Do: vi povas fari multajn frazojn!!!

Ĉu vi povas skribi kelkajn frazojn pri **via** ĉambro?



2.

Ĉu Karlo faras frazojn?
Kion li faras?
Ĉu vi povas desegni? Ĉu bele?
Mi petas: Desegnu ĉelan bildon.

La Internacia Junular-Kunveno 1950 en Konstanz, Germanujo. ¹⁾

La 27-an de julio ni foriris al Konstanz, kie okazos la T.J.O.-kunveno. Je la oka kaj kvardek minutoj matene ni forveturis de New St. Stacidomo, Birmingham. La vetero estis bela kaj ni estis tre feliĉaj. Ni vojaĝis tra Londono, Folkestone kaj transiris la maron al Calais, kie ni restis ĝis la deka horo vespere. Tiam komenciĝis la tre longa vojaĝo al Basel, kie ni alvenis je la sesa horo matene. Ni veturis tra la bela Svislando al Konstanz. La vetero estis tre varma kaj ni estis lacaj.

Ĉe la kongreso estis pli ol kvarcent gejunuloj el dudek diversaj landoj. La kongreso daŭris nur unu semajnon, sed ni ĝuis ĝin tre multe.

Ni vizitis multajn interesajn lokojn. Inter ili estis Schaffhausen (Svislando), kie ni vizitis la Rhein-akvofalon. Ĝi estis tre bela, sed ne la vetero, kiu estis malvarma kaj pluva.

Ni vizitis ankaŭ Bregenz en Aŭstrujo kaj supreniris la Pfändermonton per ŝnurvagonaro. Ni atingis Bregenz per ŝipo post tri horoj sur la lago.

Alian tagon ni vizitis Meersburg, tre bela, malnova urbo, kun bela kastelo kaj multaj vinberejoj.

Estis festvesperoj por kvar landoj: Francujo, Germanujo, Nederlando kaj Britujo. Nia vespero estis je mardo kaj nia grupo kontribuis multajn erojn. Ni multe ĝuis ĉiujn vesperojn.


Ankaŭ la urbo Konstanz estas bela, ĉefe la malnovaj konstruaĵoj kaj la lago, kiu estas bona ankaŭ por naĝado kaj ŝipekskursoj.

Ankaŭ dum la dua semajno, kiam ni restis post la kongreso, ni vizitis interesajn lokojn: la insulojn Rheihaŭ, Mainaŭ kaj Lindaŭ kaj la Monaĥejon de Birnaŭ.

Ni tute ne deziris reiri hejmen.

Ann Wilson (15-j.), 70 Dinsdale Rd., Northfield, Birmingham 31,
Anglujo (lernantino de Tinkers Farm Lernejo).

1) Premiita verkaĵo.



Mi kondukas la jungitan mulilon. La ĉareto estas plenplena. La vojeto estas ŝtonplena. Kaj jen kruta deklivo. Necesas instigi la beston. Mi iom vipas ĝin kaj ĝi ekkuretas. Ĝi ege tiras. Ĝiaj oreloj klinas sin; la muskoloj streĉiĝas.

Fine ni atingas la supron kaj ni haltas iomete. La mulino spiras forte. Ĝia ventro tremas. Vaporo eliras el ĝiaj nazegoj.

Ni daŭrigas la vojon kaj atingas la ĉefan vojon. Sed jen denove deklivo. La besto aspektas pli timema ol antaŭe. Eble pro la malseka makadamo, kiu estas glata.

Mi denove frapas la beston por instigi ĝin, sed ĝi marŝas laŭ la bordo de la vojo.

Post la laboro mi karesas ĝin amike kaj diras:

„Malfacila estas la laboro, sed ni sukcesis, ĉu ne?“

Dubois, Francujo (verkita laŭ la Freinet-tekniko).

Sankta Klaŭzo.

Tre, tre malproksime, en la centro de la Norda Poluso, loĝas tre maljuna viro kun sia edzino kaj miloj da elfoj. Li loĝas en malgranda, sed bela domo. En la ĉefa ĉambro staras tre komforta seĝo. En ĝi la maljunulo sidas nokte. Li fumas pipon kaj legas listojn k.t.p.

Ekster la domo estas bela cervejo. Tie loĝas dek aŭ eĉ pli da cervoj.

Kaj apud la cervejo estas multaj malgrandaj fabrikoj. Tie laboras la multaj elfoj. Dum la tuta jaro la elfoj fabrikas ludilojn por bonaj infanoj. Ili tre ŝatas sian laboron.

Kaj dum tuta jaro „Sankta Nikolao” (en Usono nomita „Sankta Klaŭzo”) rigardas la hejmojn de ĉiuj infanoj sur la mondo. Li vidas, ĉu tiuj infanoj estas bonaj aŭ malbonaj. Antaŭ Kristnasko li kalkulas la malbonajn agojn. Se ili ne estas grandnombraj por iu infano, li skribas la nomon de tiu infano sur liston.

Tion li faras jam multajn miljarojn kaj ĉiam li portas la samajn vestojn, ruĝ-oranĝajn. Li havas tre longan, blankan barbon. Liaj okuloj estas bluaj kaj brilaj kaj aspektigas lin feliĉa. Li estas tre, tre peza. Kaj laŭ konata angla poemo „lia ventro skuiĝas, kiam li ridas, kiel poto da konfitaĵo”.

En la nokto antaŭ Kristnasko li eliras el la domo kaj kolektas la ludilojn, kiujn oni faris dum la pasinta jaro. Li metas ilin en grandan sakon kaj metas tiun sakon en grandan glitveturilon. Ok cervojn li ligas al la veturilo. Tiam li mem eksidas sur la selo kaj komencas veturi. La cervoj povas flugi kaj ili flugas en la aero, tra la tuta mondo. Kiam Sankta Klaŭzo venas al la domo de iu bona infano, li haltigas la glitveturilon sur la tegmento. Tiam li prenas la sakon, eliras kaj glitas en la kamentubo ĝis la unua etaĝo. Kaj tie pendas, apud la kameno, la ŝtrumpoj de ĉiu infano. Li metas donacojn en tiujn ŝtrumpojn. Kaj ofte, se ĝi ne jam estas tie, li metas belan, ornamitan arbeton ĉe la kameno. Ofte Sankta Klaŭzo metas donacojn sub tiun arbon anstataŭ en la ŝtrumpojn. Tiam li ree iras en la kamenon, metas fingron al sia nazo: supren! Kaj supren li iras. Li saltas en la glitveturilon kaj iras al la sekvanta domo.

Tion li faras dum la tuta nokto. Li vizitas la domojn de ĉiuj bonaj infanoj de la tuta mondo. Ĝis nun neniu bone povis klarigi, kiel li sukcesas fari tion. Sed li sukcesas, tion oni vidas ĉiujare. Kaj la plej stranga afero estas, ke li neniam eraras pri la donacoj. Li ĉiam donas al infano tion, kion ĝi petis. Se la infano estas bona, kompreneble. En letero la infanoj skribis tion kaj donis la leteron al siaj gepatroj, por ke ili sendu ĝin al: Sankta Klaŭzo, Norda Poluso.

Donald Broadribb, Rochester, New York, Usono.

Mi skribas, kiel oni festas la kristnaskofeston.

En la antaŭtagoj oni faras bakaĵojn kaj tortojn. En la plej lasta tago oni komencas varmiĝi la banejon jam dum la antaŭtagmezo, por ke ĝi estu preta jam sufiĉe frue. Tie oni ŝvitas (= prenas ŝvitbanon) antaŭ ol la festo komenciĝas. Sen bano la festo ne povas komenciĝi.

Tagmeze oni starigas la kristnaskan arbon (piceon). Tiel la glacio kaj neĝo sur la branĉoj povas degeli antaŭ la vespero.

Kelkaj ornamas la piceon jam dumtage.

Estas tre amuze ornami la piceon. Oni ornamas ĝin per kandeloj kaj pomoj kaj per brilantaj steloj kaj paperoj.

Post la reveno el la banejo oni manĝas kristnaskan kaĉon.

Poste venas koboldo, kiu havas donacojn por ĉiuj.

Olli Tuuainen, Pyylinsaari, Finnlando.

ENIGMOJ.

Mi ricevis dudek solvojn. Neniu trovis malpli ol sep el la dek vortoj. Bedaŭrinde nur angloj faris provojn.


Nova enigmo: 1. Kie vi studas. 2. El kiuj konsistas la skeleto. 3. Montri aprobon. 4. Organo, kiun vi nun uzas. 5. Filo de via patro. 6. Manvesto. 7. Pri kio vi mem laboras. 8. Komenci batalon. 9. Fari patruon.

La duaj literoj de la vortoj donas helpilon al la Paco.

Sendu vian provon antaŭ la 15-a de februaro al s-ro T. K. Slade. 7 Southview Road, Southampton, Anglujo.

(Por enigmoj ni ne donas premiojn, sed vi ricevas poentojn. Unufoje en jaro ni raportos pri tio en LJY).

Kristnasko, tago de la paco.



La skoltoj kunsidis en sia hejmo kaj la estro parolis al ili pri la mezepokaj tradicioj:

„Niaj prapatroj metis kandelon apud la pordo. Ili diris, ke, kiam la dia infano revenos hejmen, li tiel scios, ke oni plezure akceptos lin. Memore al niaj prapatroj ankaŭ ni metu kandelon ĉe la pordo.”

Poste la skoltoj kantis kelkajn kristnaskajn kantojn. Ĉar estis esperantistoj en la trupo, oni ekkantis ankaŭ la internacian Esperanto-himnon „En la mondon venis nova sento, Tra la mondo iras forta voko”

Tok, tok, tok! Iu frapis la pordon.

„Envenu!”

Kaj laca viro envenis.

„Mi petas, ke vi senkulpigiu min pro mia malfrua alveno. Sed se vi havus iom da pano por mia infano, vi grave helpus min.”

„Kie do estas via infano?”

„Mi lasis mian infanon kaj mian edzinon en apuda kabano kaj diris al ili, ke mi baldaŭ revenos”.

„Mi kondukos ilin ĉi tien!” diris unu el la skoltoj.

La estro invitis la viron kaj liajn edzinon kaj infanon sidiĝi kaj partopreni la kristnaskan manĝon.

Dum la mizeruloj dormis en la skolta hejmo, la plej juna skolto diris: „Mi ĝojas, ke ni povis fari bonan agon dum nia kristnaska nokto. Ni bone plenumis nian devon.”

„Vi ĝuste komprenis,” respondis al li la estro, „kial niaj prapatroj metis kandelon ĉe la pordo. Ĝi estis signo de helpemo al la malfeliĉuloj. Jen la vero pri la tradicia kandelo. Estu ĉiam preta helpi al tiuj, kiujn vi renkontas sur via vojo.”

Kiel esperantistaj geskoltoj ni devas klopodi por esti la pioniroj de la amo inter la homoj kaj montri, ke la skolto vere estas amiko de ĉiuj homoj. Tiel ni estos veraj pacbatalantoj. Ĉar ne ekzistos paco antaŭ ol la homoj amos unu la alian.

Zigzaganta hipopotamo.

T.J.O.-RUBRIKO.

(Sekretariino: *Helmi Veldhuyzen, Hof v. Delftlaan 79, Delft, Nederlando*.)

La estraro kunvenis la 26-an de novembro. La ĉefa diskutemo estis la 7-a Internacia Junular-Kunveno en 1951. Kun granda ĝojo ni povas sciigi al vi ke ĝi okazos en la nederlanda urbo Haarlem. Pliaj detaloj estas troveblaj en la speciala rubriko. Ni do ne

akceptis la inviton de la aŭstra urbo Kufstein. Pro diversaj cirkonstancoj montriĝis pli oportune kongresi en Nederlando. Al la urbo Kufstein ni esprimas nian sinceran dankon pro la afabla invito. Eble en iu sekvonta jaro ni povos kunveni tie!

Francujo: Ĉar nia movado bone organiziĝu estas necese, ke ni havu lokajn TJO-sekciojn en nia lando. Tiuj, kiuj jam estas spertaj esperantistoj kaj havas la eblecon starigi sekcion, simila al tiu en Parizo, bonvolu rilati kun la franca ĉefperanto: Roger Bizez, Wierre-au-Bois-par Samer, P. d. C. — La laboro de la sekcioj estos organizi: studkunvenojn por Esperantistoj, informkunvenojn por ne-Esperantistoj, publikajn kursojn, vizitojn al najbaraj grupoj, ekskursojn, k.t.p.

POŝTMARKRUBRIKO.

En oktobro ni ricevis belgajn, anglajn kaj nederlandajn poŝtmarkojn de f-ino M. Devos, f-ino Nesto Ford, s-ro De Vries kaj s-ro Brachetti.

Koran dankon kaj ni esperas, ke vi jam ricevis viajn.

En decembro ni esperas ricevi denove multe da p-m. La libro-servo interŝanĝas ĉiun kvanton.

Fine grava peto: Se vi ne ricevis viajn p-m., kiam ni publikigas vian nomon en „La Juna Vivo”, skribu al ni. Ni jam trifoje rimarkis, ke leteroj kun p-m. perdiĝis.

Se vi ne trovas vian nomon en ĉi tiu rubriko, skribu al ni.

Libro-Servo, M. Tinxgracht 10, Edam, Nederlando.

La unuaj francaj poŝtmarkoj.

La antaŭan jaron la Franca Poŝto festis la datrevenon de la unuaj francaj poŝtmarkoj aperintaj en 1849-a.

La unua serio de francaj poŝtmarkoj, sendentaj, montris la vizaĝon de Ceres, la latina diino de agrikulturo (greke: Demeter), en ronda kadro.

La ok poŝtmarkoj de tiu serio nun estas tre maloftaj kaj tre serĉataj de la kolektantoj. Kelkaj el ili tre multe valoras.

En la jaro 1852-a, kiam Louis-Napoleon Bonaparte, nevo de Napoleon la 1-a, fariĝis prezidanto de la Respubliko, la vizaĝo de la diino estis anstataŭata de la vizaĝo de la „Princo-Prezidanto”. Kaj kiam en 1853 Louis Napoleon fariĝis imperiestro, la teksto „Répub. Franç.” (Franca Respubliko) fariĝis „Empire Franç.” (Franca Imperio).

Poŝtmarkoj, samtipaj kiaj la unue aperintaj (Ceres), aperis en 1870 (restarigo de la Respubliko), 1938 kaj en 1945. En 1949, por rememorigi la centjaran datrevenon, estis eldonata vertikala strio da poŝtmarkoj: supre 2 poŝtmarkoj, ekzakte samtipaj kiaj tiuj de 1849 kaj sendentaj (nur la montrita valoro ŝanĝiĝis) kaj mal-supre 2 p-m. laŭ la tipo de la nunaj poŝtmarkoj, ordinaraj uzataj (vizaĝo de Marianne, la Respubliko), dentitaj. Inter la du partoj spaco portis la tekston: „Jarcento 1849—1949 de la poŝtmarko”.

Ankaŭ okaze de tiu datreveno okazis la antaŭan jaron tre grava internacia filatela ekspozicio en la „Granda Palaco” de Parizo, kie la filatelistoj povis admiri la grandvalorajn poŝtmarkojn kaj kie staris ankaŭ Esperanto-montrobudo, kiu ricevis eĉ oficialan premion pro sia bela prezentado de dokumentoj pri „Esperanto kaj la poŝtaj rilatoj”.

Michel Duc, Francujo.

Afabla peto! Vi multe helpas nin, se vi pagas vian kotizon por 1951 antaŭ la 1-a de januaro 1951. Ni jam antaŭe dankis vin pro via helpo.

Pro la kurzoŝanĝiĝoj ni bedaŭrinde ree devis plialtigi la kotizon en Aŭstrujo. Ĝi nun estas 20 ŝil. (por lernejoj 8 ŝil.)

La tempo nun estas favora por varbi novajn abonantojn! Ĉiu novulo ricevos la decembran numeron senpage! Kiu antaŭ la 1-a de januaro varbas almenaŭ 3 novajn abonantojn, ricevos surprizon. Nia germana amiko Michel Schmidt jam varbis 40!!! Kiuj sekvos???

RICEVITAJ ESPERANTAJOJ.

4-paĝa prospekto de K.L.M. (Reĝa Nederlanda Aertrafika Kompanio) eldonita okaze de la 36-a Universala Kongreso en München.

Ferioj en Germanujo, 4-paĝa informbroŝuro, eld. de „Deutsche Bundesbahn”.

Bavario, belaspekta, riĉe ilustrita faldprospekto kun teksto, tradukita de d-ro Ziegler. Eld. de la ŝtata komisiito por la Bavara. Fremdultrafiko.

Vortoj kaj Esprimoj por Komencantoj, kompilitaj de C. B. Zondervan, eld. de J. Muusses, Purmerend, Nederlando. Prezo 1,15 guld.

70-paĝa, tre praktika libreto dulingva (Nederlanda-Esperanta), kiun multaj kursgvidantoj certe volonte enkondukos flanke de la lernolibro. Ĝi ja havigas al la lernantoj aron da vortoj, kiu multe povas helpi al ili konversacii. Sed certe ankaŭ por progresantoj la libreto estas rekomendinda.

Tutmonda Adresaro de Esperantistoj, 1950, de H. Steiner, sub la aŭspicio de la Int. Esperanto-Muzeo en Wien. 154-paĝa libro. Prezo 12 int. respondkuponoj. Bedaŭrinde diversaj adresoj en la libro ne plu ĝustas.

Jarlibro de U.E.A., 2-a parto 1950, kun la dua parto de la Marista Terminaro. Liverata nur al Individuaj Membroj de UEA, Herongate, Rickmansworth, Herts, Anglujo.

Leerboek van Esperanto, de F. Randi. Eld. de Witteryck, Hoefijzerlaan 14, Brugge, Belgujo. Prezo 30 belgaj fr. — Plena Esperanto-kurso kun tradukmaterialo por Nederlandlingvanoj (ankaŭ por hejmstudentoj).

Konstitucio de Popola Respubliko Bulgario (4 dec. 1947), en Esperanto tradukita de M. Conkovski. Prezo ne indikita. La Bulgara Esperantista Kooperativo, 15 Tri Uŝi, Sofio, eldonis 5000 ekz. de la 24-p. libreto.

Esperanto-Norsk Ordbok, de Ragnv. Rian. Eld. de Esperanto-forlaget a/s Oslo. 174-paĝa, bindita, belaspekta vortaro Esperanta-norvega. Juĝante laŭ la esperantaj vortoj (la norvegajn ni ne konas) la libro ŝajnas tre detala.

An International Auxiliary Language: 16.000.000 People Want Esperanto, Will New Zealand help? de A. J. Sinclair. 20-p. propaganda broŝuro (angla) kun la aldono „Impresoj pri la kongreso en Bournemouth” de Lapenna. — „Kion diris la Majstro?” 4-p. broŝuro, resumoj el paroladoj de d-ro Zamenhof. Ambaŭ broŝuroj estas eldonitaj de Rotario Klubo de Te Awamutu en Novzelando. Prezoj ne indikitaj.

KORESPONDADRESOJ.

Bulgarujo: Zlatko Iliev Markov (17-j.), str. „Mesta” 20, Burgas, dez. kor. k.l.t.m. kaj intera. p-m., p-k., gazetojn, fotojn, jurnalojn, k.t.p.

Francujo: Profesoro dez. kor. kun kolegoj pri sciencoj (fiziko - hemio). S-ro Pialla, Collège Nyons, Drôme.

Hispanujo: 22-j. stud. dez. kor. k.f.-inoj pri ĉ.t., k.fraŭloj pri sia profesio (inĝeniero). A. de Barberá y Sobreperere, Garcia Morato 26-10, Reus.

Hungarujo: Hungara fraŭlo dez. kor. k.itala k.japana f-inoj. Resp. certa. Temesi Istvan, Hejocsaba.

J. Bangha-Varga, 30-j. teknikisto, XI Bartok Bela str. 50. II. I/a, Budapest. dez. kor. kun ges.anoj precipe pri teknikaj problemoj.

Nederlando: 15-j. gimnaziano dez. kor. kun junaj gesamideanoj en la tuta mondo. F-ino Ella de Langen, Rotterdamseweg 99, Delft.

VERDLANDO VOKAS.

Listo de radiodisaŭdigoj en aŭ pri Esperanto kaj informoj.

Tempindiko laŭ M.E.T. (= mez-eŭropa tempo).

Mallongigoj: I = informoj. P = parolad(et)o. K = kurso. M = muziko.

Ĉiutage	19.45—20.00	Sofio, 39,11 m: I kaj P.
Dimanĉe	17.00—17.20	Romo, 19,5 m, 31,1 m: I kaj M.
Lunde	6.30— 6.35	Vieno, 25 m, 31 m, 41 m, 48 m, 513 m: I.
	8.15— 8.30	Stokholmo, 19,80 m, 49,46 m: I.
	8.45— 9.00	Rijssel (Lille), 235 m: P.
	16.15—16.30	Stokholmo, 19,80 m, 27,83 m: I.
	17.30—18.00	Rio de Janeiro, 30,71 m, 375 m: K.
	23.15—23.20	Hilversumo II, 298 m, V.A.R.A.: I. (Nur ĉiudusemajne: 11/12/'50 k.t.p.).
Marde	2.15— 2.30	Stokholmo, 19,80 m, 27,83 m: I.
	12.55—13.00	Berno, 13,94 m, 31,46 m, 48,66 m: P. de d-ro Arthur Baur.
	18.40—18.45	Berno, 19,60 m, 31,46 m, 48,66 m: Ripeto de la tagmeza disendo.
Merkrede	0.45— 1.00	Gvatemalo, 49 m: I.
Ĵaŭde	9.30— 9.45	Parizo, 48,39 m, 347 m: K.
	12.55—13.00	Berno, 13,94 m, 31,46 m, 48,66 m: P. de d-ro Edmond Privat pri mond-federacio kaj mond-paco.
	18.40—18.45	Berno, 19,60 m, 31,46 m, 48,66 m: Ripeto de la tagmeza disaŭdigo.
Vendrede	17.00—17.20	Romo, 19,5 m, 31,1 m: I kaj M.
	18.15—18.30	Hilversumo I, N.C.R.V., 402 m: P. (Nur unufoje en du monatoj). 15-12-'50: s-ro C. P. Brakké pri: „La tago de la Libro”. La muzikan enkadrigon prizorgos Jelly Koopmans-Schotanus (solkantado) kaj Meindert Boekel (orgeno).
Sabate	23.15—23.20	Hilversuma I, K.R.O., 402 m: I.

Informoj kaj petoj:

Novaj eksilento kaj redisaŭdigo en Esperanto! — Nun ankaŭ Varŝavo ĉesigis siajn elsendojn en Esp. B. v. skribi al Radio Warszawa, Koszydowa 8, Warszawa (Pollando). Sed Rijssel (Lille) denove havas Esperanto-radioprogrameron. Vidu en supra listo: Lunde.

Informojn pri Esperanto-radio-elsendoj sendu ne nur la radio-stacioj, sed ankaŭ la radio-aŭskultantoj al: S. S. de Jong Dzn., Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, Tjerkwerd (Fr.), Nederlando.